

ŝafoj”) ĵetas kontraŭ la nova lingvo, ĉi ĝi estas la itala, „Nobla Vulgara” de Dante, aŭ la Esperanta, „Internacia Lingvo” de Zamenhof; tio estas, la akuzoj venas pro nekonfeseblaj kialoj (Conv. I, XI, 2 sekv.): „*blindeco ĉe la juĝado*”, juĝi la lingvon sen koni ĝin, blinde; „*malica ekskuzado*”, kredi, nur ĉar oni mem ne konas ĝin, kaj do oni ne scias ĝin uzi, ke ĝi ne povas havi literaturan valoron; „*deziro al fanfaronado*”, vantemo, ĉar oni konas unu aŭ pliajn fremdajn lingvojn; „*motivo de envio*”, „ĉar — diras ĉiam Dante — unu ĝin ne scias uzi kiel ĝin uzas la alia, naskiĝas envio” kaj eble ankaŭ ĵaluzo, pro la timo ŝajni malsupera al tiuj kiu la novan lingvon (vulgara aŭ Esperanto) akceptis kaj penis lerni; „*senkuraĝo de la koro*”, la eterna timo ŝajni ridinda, kaj admiro al ĉio, kio estas eksterlanda; kaj mi ne kuraĝas rediri la bruligajn vortojn kiujn Dante uzas pri siaj kontraŭuloj tiamaj: „laŭ kies kondukado iras la bilnduloj pri kiuj mi aludis ĉe la unua akuz-kialo”, la homoj kiuj ne scias pensi per sia proprakapo kaj diskutas kaj prijuĝas sen koni tion (vulgaran aŭ Esperanton) pri kio oni parolas.

Ni devas agnoski, ke la simileco, mi eĉ dirus la egaleco inter la respektivaj pozicioj de Dante kaj de Zamenhof estas vere surpriza.

Kaj, se ni priatentas la karakterojn, malsamajn pro tiom da signoj, de tiuj ĉi du kredintoj je la universalaj valoroj de la homo, ni devas tamen rekoni, ke de l'unua kaj de la dua venas al ni, finfine, sama leciono pri anima firmeco, de homoj kiuj daŭrigis, fiere — aŭ humile — ĝis la fino de sia homa vivo.

Kaj la fina venko de la lingvo kreita de Dante (tra la opozicioj de la kleruloj de la malfrua XVI.a jarcento kaj la malklerigo dum la tuta XV.a), en la majesta florado de la itala Renesanco, estas bonaŭgura, por ni, de la fina venko ankaŭ de la lingvo kreita de Zamenhof, la milda sciencisto kiu rifuzis la nomon „majstro” kaj volis „kutimigi la homojn vidi en sia proksimulo nur homon kaj fraton”.

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 1

179.6:001 (Luĉ. Vanini)

HEROOJ KAJ MARTIROJ DE SCIENCO

LA SORTO DE LUĈILIO VANINI

(A. Belov, Moskvo, Sovetunio)

Lia vivo estis mallonga kaj belega. La tutan ĝin li dediĉis al servo por scienco, ĉar li kredis, ke nur scienco kapablas kompreni kaj ekspliki la mondon, kiu vastiĝas ĉirkaŭ ni, diveni la misterojn de la universo, la mirindajn enigmojn de la naturo.

Luĉilio Vanini naskiĝis en la suda Italio, en vilaĝo Tavrizano. Nesatigebla soifo pri scioj, neordinaraj kapabloj de la knabo jam ekde la junaĝo atentigis pri si.

La knabo Luĉilio forlasis la hejman vilaĝon kaj venis Romon por „atingi sciencojn”. Ĉi tio okazis en limo de XVI kaj XVII jarcentoj.

Soife studis li astronomion, anatomion, jursciencan, matematikon, teologion... „Mi neniam rezignis kiun-ajn bonŝancon por lerni ion, konvinkita, ke ni scias ege malpli multe kompare kun tio, kion ni ne scias”, — skribis poste Vanini.

Li estis 21-jaraĝa, kiam en Napolo oni lin solene vestis en doktoran tunikon. Antaŭ la juna sciencisto, doktoro de jurscienco, malfermiĝis grandaj vojoj en scienco. Sed Vanini denove sidiĝas sur studentan benkon por daŭrigi la studadon. Li aŭskultas prelegojn de famaj sciencistoj kaj filozofoj en Romo, Napolo, Padova, poste en Germanio, Svisio, Anglio. Pri sciavido Vanini estis nesatigebla.

La konatiĝo kun verkoj de elstaraj filozofoj tiutempaj, de sciencistoj naturessploristoj alkondukis lin al profunda pensado. Ĉu ĝuste tiel estas konstruita la mondo, kiel eksplikas teologoj? Ĉu vere la tuta naturo, ĉiuj ĝiaj fenomenoj estas regataj fare de dia providenco? Per dia volo estas facile ekspliki nekompreneblajn fenomenojn, pri kiuj plenas la naturo, sed ĉu estas vera ĉi tia ekspliko?

Luçilio Vanini venis al konvinko, ke teologio konscie forĝvidas homojn laŭ vojo de miskonceptoj, igante ilin blinde fidi al »la sankta« skribo. Eksplikojn de natur-fenomenoj necesas serĉi en la naturo mem. »Ne sur la ĉielo, sed sur la tero, — diras la juna sciencisto, — oni devas serĉi solvon de tiuj nekompreneblaj fenomenoj, kun kiuj ni havas okazojn renkontiĝi en la vivo«.

Jam en siaj unuaj publikaj prelegoj Vanini refutis religiajn doktrinojn pri dia kreado de la mondo, li asertis, ke la naturo evoluas laŭ siaj propraj leĝoj, ke la movado de la ĉielaj objektoj kaj de la tero okazas memstare, sen kia-ajn enmiksiĝo fare de supernaturaj fortoj. Li diris, ke la doktrino pri dio, la supozata ĉion-vidanta estaĵo, estas elpenaĵo de ekleziuloj, al kiuj estas profitoze teni simplajn homojn en timo kaj humilo.

Necesis havi kuraĝon, koron de vera sciencisto, por ke oni tiutempe malkaŝe proklamu tiajn konceptojn. Luçilio Vanini certe komprenis, ke la katolika eklezio ne pardonos lin pro tia ĉi »liberpensemo«.

Super la kapo de la juna sciencisto komencis densiĝi nuboj. Laŭ insistaj petoj de amikoj li en la jaro 1612. decidis forlasi Italion. Li veturis Anglion, kie li esperis okupiĝi pri sciencoj, ne timante persekutojn fare de katolikaj inkvizitoroj.

En London la sciencisto faris decidan paŝon. Li malkaŝe deklaris pri sia rezigno for de katolikismo kaj esprimis bedaŭron, ke la tutajn pasintajn jarojn li troviĝis en sino de la katolika eklezio.

En Anglio tiutempe regis anglikana eklezio, unu el la ĉefaj protestantismaj movadbranĉoj. Sed por Vanini estis indiferente, kiu eklezio predikas kristanisman ideojn. Li atakas ĝuste la ideojn. Sed la anglikana eklezio ja agnoskis la samajn dogmojn, kiujn predikas la katolika pastraro, bazante sin sur la samaj »sanktaj« libroj. Senmaskigante la kristanan kredo-doktrinon, Vanini, efektive, kritikis ankaŭ la anglikanan di-kredon. La ĉefoj de la anglikanismo ne tuj komprenis tion. Ili opiniis, ke Vanini estas malamiko de katolikismo, kaj sekve li povas esti ilia federano. Sed evidentiĝis, ke li estas ilia malamiko.

Denove komenciĝis persekutoj kontraŭ la sciencisto. Li suferis ofendojn, fiatakojn kaj mokturmentojn flanke de la fidelaj servistoj de dio. Finfine oni arestis Vanini'n kaj ĵetis lin en antikvan londonan malliberejon Taŭer. La verdikto de la juĝistoj estis — morto.

Ĉiutage la kaptito atendis mortekzekuton. Sed amikoj de Vanini faris ĉion eblan kaj neeblan kaj ili penatignis nulligon de la mort-verdikto. Vanini devis por ĉiam forlasi landlimojn de Anglio.

Li vojaĝis Francion. Ree la nedormema okulo de la inkvizitoroj sekvas ĉiun paŝon de la sciencisto. Unu nesingarda vorto, unu libera-pensa eldiro, kaj li povas trafi la karcerojn de la inkvizicio, el kiaj eliro ne ekzistas.

Vanini daŭrigas defendadi siajn ideojn, sed li iĝas tre singarde-ma, Siajn pensojn li envolvas en tian formon, ke eĉ la plej fifervoraj denunciistoj ne sukcesas verkaĉi denuncon pri li. Li uzas alegoriojn, ruzaĝajn agmanierojn por trompi la ekleziistojn. En la jaro 1615. en Francio aperas verko de Vanini »Amfiteatro de eterna providenco«. Sur paĝoj de la verko Vanini senmaskigas... ateismon. Ĉu li do rezignis for de siaj ideoj, retiriĝis sub premo fare de pastraro? Ne. Tio estis taktika paŝo de la sciencisto.

En la historio de scienco la verko de Vanini okupas eksterordinaran lokon. Ĝi estas brila ekzemplero de tio, kiel per sprita arango de la libro, per specifa uzmaniero de la materialo eblis propagandi ateisman ideojn en la plej obskuraj jaroj de la eklezia regado. Ŝajne senmaskigante liberpensulojn Vanini detale kompernigis siajn aspektojn, citadis grandajn fragmentojn el verkoj de sciencistoj-ateistoj, per tio disponigante por ili malkaŝitan tribunon sur paĝoj de sia verko. Kaj ĉi-apude »por refuti« iliajn aspektojn li uzis tiom senfortan argumentadon, ke ĉiu-ajn eĉ iomete pensema leganto komprenis, kiu pravas en la disputo — ateismo aŭ teologio.

Sed Vanini vane opiniis, ke estas tiel facile kaj simple trompi la inkvizitorojn. La ekleziistoj tre baldaŭ rimarkis ribelon en la verko de Vanini. Al li denove minacas akuzo pri herezo, pri provoj kritiki kristanajn doktrinojn. Kaj la sciencisto, jam tioman fojon, estis devigita savi sin per fuĝo.

Denove vivo de vagabondo, plena de danĝeroj. Tamen li daŭrigas verkadon. Liajn verkojn penetras optimismo, kredo pri plenpotenco de la homa racio. Li deklaras en ili kiel materialisto, kiu agnoskas eternecon kaj neeblojn krei materion. Li diras pri tio, ke dio estas kreita per fantazio de homoj mem, ke ĝin naskis senfonto, timo de prahomo antaŭ nekonataj kataklismoj de la naturo. Sekve, religio estas historia. Ĝi aperas dum difinita etapo de evoluo de la homsocio kaj same formortas. »Ni vidas, ke imperioj kaj religioj ankaŭ havas sian komencon kaj finon«, — skribis li.

Li senkompate senmaskigadas la miraklojn de religio, montras la ridindecon de superstiĉoj. Li diras, ke ĉio ĉi estas iloj, per kiuj religio trompas facilcredemajn homojn.

Ne multe da pensuloj estis en tiu epoko, kiuj tiel kuraĝe defiis kontraŭ religio. Vanini sciis per kio minacas al li tielaj deklaroj, sed

konscienco de sciencisto igis lin diri sian vorton. Kaj tio estis vera glorigo.

*

* *

En malfrua aŭtuno de la jaro 1618. oni enkarcerigis la scienciston. Li komprenis per kio tio finiĝos, sed li brave atendis sian sorton. En februaro de la jaro 1619. la juĝistaro verdiktis: la akuzito pri herezo doktoro Luĉilio Vanini estas kondamnita je mortekzekuto...

La ekzekutoroj malice ĝojis: finfine do venis la horo de kvitiĝo kun la herezulo, kiu arogis igi duba tion, kion instruas la eklezio.

... Alte saltleviĝis la inkvizicia punfajro, aranĝita sur unu el plaĉoj de Tuluzo. Forbruligi vivan montriĝis nesufiĉa al la ekzekutistoj. Antaŭ ol irigi lin en la punfajron, ili elŝiris lian langon...

Tiel pereis Luĉilio Vanini. Lia aĝo estis tridek kvar jaroj.

(El la rusa tradukis A. Zisman)

PRI LA ARTIKOLO „VORTOFTECO”

(A. W. Thomson, *Scienca Revuo*, Vol. 19, n-ro 2)

Antaŭ ĉio mi deziras gratuli s-ron A. W. Thomson pri lia zorga analizado de la vortmaterialo entenata en FABELOJ IV de Zamenhof. Tiaj studoj estas vere utilaj kaj instruaj. Ankaŭ tre interesa la sugesto fontanta el tiu studo, nome ke kompostistoj povus ŝpari monon, se la presejoj enkondukus la tipojn LA, KAJ, DE, EN. Pri kio mi ne povas konsenti kaj kontraŭ kio mi dezirus averti, estas la sugesto, ke en nova eldono oni korektu kelkajn esprimojn arkaismajn — aŭ eĉ lingvajn erarojn (laŭ la nun akceptata normo). Evidentajn preserarojn oni rajtas korekti, sed ĉion ceteran en la lingvaĵo de Zamenhof oni devas skrupule respekti, ĉar temas pri historiaj tekstoj kaj ĉiu leganto de tia libro havas la rajton konatiĝi kun ĉiuj detaloj de la idiomo, kia ĝi estis en la unua epoko de nia lingvo. Tio ne nur validas por la Zamenhofaj tekstoj, sed ankaŭ por verkoj de aliaj klasikuloj, kiel KABE, GRABOVSKI, k.c. — Se temas pri didaktikaj eldonoj (por lernantoj), oni ja povas fari notojn piede aŭ apendice, sed neniel anstataŭi la tekston mem. Pri tio indas legi kion G. Waringhien skribis en „Lingvo kaj Vivo” sub „Editoraj Demandoj”. Kion li tie rekomendas estas la sole honesta procedmaniero.

E. Sonnenfeld

EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 1

617.7 (katarakto)

KION ONI SCIU PRI LA KATARAKTO

(prelego en Internacia Somera Uiversitato, Rotterdam, 1967)

(A. Allbault, Toulouse, Francio)

Por kompreni la naturon de katarakto kaj la cirkonstancojn de ĝia operacio, necesas koni unue la anatomion ĉefe de l' kristalino kaj due la diversajn specojn de tiu malsano.

I. ANATOMIO DE L' KRISTALINO KAJ DE TIES ZONULO

a) La okulo.

La kristalino estas natura enokula lenso kun varianta refraktopovo, dank'al kiu la okulo povas konverĝigi lumofaskon elsenditan de punkto situanta je diversa distanco sur la retinon. Tiu ĉi estas sensiva ekrano, de kiu la opta nervo transdonos al la postera* poluso de l' cerebro la lumimpresojn ricevatajn sur ĉiu el la retin-punktoj.

Tamen la ĉefa okul-dioptro estas la korneo, kiu multe pli forte — sed nevarie — refraktas la lumon. La okula aparato estas kompletigita de diafragmo situanta ĝuste antaŭ la kristalino kaj konstituita de l' iris kaj ties aperturo: la pupilo.